

# LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato  
Jarkolekto 4, n-ro 3 (21): septembro-oktobro 2011

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas  
ekde la numero 13 (majo-junio 2010).

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,  
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: [pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

## Redaktore...

*Karaj Gelegantoj,*

*Finiĝis la ferioj. Denove ĉiuj infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj, bone ripozintaj, reiris al sia lernejo, respektive laborloko.*

*Ankaŭ la belga parlamenta jaro komenciĝas monaton pli frue, ĉar la lando urĝe bezonas novan registaron post pli ol tuta jaro sen plenpova registaro. La krizo ne nur paralizas la normalan politikan aktivecon, sed minacas ankaŭ la prosperon de la belgo, kiu ankaŭ suferas pro la internacia monkrizo. Ni esperu, ke oni baldaŭ trovos solvon por tiu ĉi grava politika krizo.*

*Reagante al artikolo en la brusela Esperanto-revuo "Aktuala Esperanto" pri la krizo en Belgio vidata de franclingvano, mi provas priskribi aliloke en tiu ĉi numero kiel eble plej objektivite la vidpunkton de la flandroj.*

*Se ĉiuj belgoj pretas demeti ĉiun ŝovinismen, popol-egoismen kaj malfidon, kaj honeste aliri la alian, konatiĝo kun la vidpunkto de la aliaj partoj de la lando povas interproksimigi ĉiujn loĝantojn kaj apudigi taŭgan solvon.*

*Agrablan legadon!*

*Pieter Jan Doumen*

## Dua Libro de l' Lingvo Internacia (2) (*Tweede Boek van de Internationala taal*) (2)

Legante la unuajn kajorojn de mia libro, multaj kredeble restos nekontentaj, ĉar ili eble tie ne trovos respondon je l' demandoj, kiujn 'ili' sendis; kaj ĉar lia 'propra' demando en la okuloj de ĉiu estas la plej grava, multaj kredeble ekkrios: "Kio<sup>1</sup> li parolos sole pri aferoj tute sensignifaj, kaj pri l' aferoj efektive gravaj li ne parolas<sup>2</sup> eĉ unu vorton!" La leganto oferu al mi iom da atendemo, ĉar ĝis<sup>3</sup> la fino de l' jaro


<sup>1</sup> Rusismo por kial'.

<sup>2</sup> Rusismo por 'diras'.

<sup>3</sup> Rusismo por 'antaŭ'.

'ĉiuj' estos kontentigitaj. Se en unu de l' unuaj kajoroj tiu aŭ alia demando estas jam ŝajne finita kaj liberigos la lokon por alia demando, tio tute ne devas pensigi, ke mi jam pli<sup>4</sup> ne parolos pri ĝi. Ĉar pri multaj demandoj mi donos en la unuaj kajoroj sole mian 'personan' juĝon, sed poste mi revenos al ili kaj donos la decidan 'finan', ricevitan per la juĝo de l' publiko.

Pro la celoj de l' afero la libro ne estos unu sistema verko – ĝi estos simple mia interparolo kun l' amiko de l' lingvo internacia.



L.L. Zamenhof en 1887

La kosto de ĉiu kajero estos 25 kopekoj. Kiu volas, ke mi sendu al li ĉiun venontan kajeron tuj, kiam ĝi estos preta kaj eliros el la presejo, tiu sendu al mi la koston de l' venonta kajero tuj post la ricevo de l' antaŭiranta.

Antaŭ ol fini la antaŭparolon, mi promesas al mi ripeti ankoraŭ la peton, kiun mi jam esprimis en mia unua verko: ĉiu pene juĝu la aferon, proponitan de mi, kaj ĉiu montru al mi la erarojn, kiujn li trovis en ĝi, aŭ la plibonigojn, kiujn li povas proponi. Se la leganto ne povis ankoraŭ tute bone ekkoni mian aferon el mia unua libreto, tiu ĉi mia dua libro povigos lin post kelka tempo ekkoni ĝin tute kaj ĉiuflanke. Por ke mia afero venu al dezirinda celo,

<sup>4</sup> Nuntempe 'plu'.

estas necese ne sole, ke la mondo diru sian juĝon pri tiu ĉi afero, sed ke mi 'sciu' la juĝon de l' mondo kaj povu ĝin uzi por mia laboro.

Dissendante mian unuan verkon al la redakcioj de l' gazetoj, mi petis ilin alsendi al mi tiun numeron de l' gazeto, en kiu estos kritiko de mia afero: sed bedaŭrinde tre malmultaj plenumis mian peton, kaj sciiĝi<sup>5</sup> mem, kie, kiam, kaj kio estis parolata pri mia afero, estas por mi tute ne ebla. Tial mi petas la 'legantojn' de l' gazetoj sendi al mi la numerojn, en kiuj ili legis ion pri l' afero, proponita de mi, kaj jam antaŭe mi esprimas al ili mian koran dankon. Mi petas ĝin<sup>6</sup> ne por 'mi', sed pro l' afero.


Fine, antaŭ la komenco de mia interparolo kun la amikoj de l' lingvo internacia, mi esprimas ankoraŭ unu fojon mian varmegan dankon al la publiko por la helpemo, kiun ĝi montris al mi; mi esperas, ke la kunsento de l' publiko ne malvarmiĝos, sed konstante kaj senĉese kreskos, kaj post tre mallonga tempo venos al celo la afero, je kiu laboras ĉiuj sferoj de l' homa socio.

Antaŭ ĉio mi parolos<sup>2</sup> kelkajn vortojn pri tiuj kritikoj, kiujn mi ĝis hodiaŭ aŭdis aŭ legis en gazetoj aŭ en leteroj al mi, kvankam mi devas antaŭsciigi la leganton, ke tiu ĉi punkto estas en miaj okuloj tre grava, kaj poste mi ankoraŭ parolos pri ĝi pli vaste. Mi nun volus fari ian premon sur la juĝo de l' publiko, kaj mi volus, ke la mondo kreu mem sian decidon en la afero, kiun mi proponis. Sed kelkaj kritikoj estis tiel skribitaj, ke mi ne povas tute silenti pri ili.

Unuj parolis pri l' aŭtoro, anstataŭ paroli pri l' afero. Ili aŭ ŝutis komplimentojn al la aŭtoro, rigardadis, kiom da malfacila laboro kredeble la afero min kostis, kaj, laŭdante la aŭtoron, ili preskaŭ tute forgesis paroli pri l' utileco kaj la signifo de l' afero kaj decidigi la publikon labori por ĝi; aliaj, ne trovante en mia verko la instruitan miksaĵon kaj la instruita-teorian filozofadon, kiujn ili kutimis renkonti en ĉia grava verko, timis, ke la pseŭdonima aŭtoro eble estas nesufiĉe instruita aŭ nesufiĉe merita, kaj ili timis esprimi decidan juĝon, pli multe penante malkovri, kiu estas la pseŭdonima aŭtoro. Por igi la kritikistojn tute apartigi la 'aferon' de la 'aŭtoro', mi publike diras mem, ke mi ne estas multe instruita lingvisto, ke mi estas tute senmerita kaj ne konata en la mondo. Mi scias, ke mia konfeso malvarmigis multajn por la afero, sed mi volas, ke oni juĝu

<sup>5</sup> Nuntempe 'ekscii'.

<sup>6</sup> Nuntempe 'tion'.



ne l' aŭtoron, sed la verkon. Se la verko estas bona, prenu ĝin; se ĝi estas malbona, ĵetu ĝin. Per kia vojo mi venis al la kreo de mia lingvo kaj laŭ kiaj metodoj mi laboris, mi ankoraŭ parolos, sed en unu de la 'venontaj' kajeroj; ĉar laŭ mi tiu ĉi demando estas por la publiko sen signifo: por la mondo estas gravaj sole la 'rezultatoj'.

Aliaj ekbrilis per senfinaj filozofadoj kaj skribis instruitajn artikolojn, tute ne pensinte kaj ne demandinte sin, ĉu ili parolas logike kaj afer-tuŝante. Anstataŭ provi praktike (kion fari estas tre facile), ĉu la lingvo, proponita de mi, taŭgas por internacia kompreniĝo, ĉu ĝi efektive al ĉiu donas la eblon esti komprenata de personoj ali-naciaj, ili parolis pri la fiziologio kaj historio de l' lingvoj vivaj; anstataŭ provi per ilia pro-pa orelo, ĉu mia lingvo estas bonsona aŭ ne, ili teorie parolis pri leĝoj de bonsoneco; anstataŭ analizi, ĉu mi bone kreis la vortaron kaj ĉu oni ne povus fari ĝin ankoraŭ pli komprenebla kaj pli praktika, ili diris, ke la vortaro devas esti farita el radikoj Sanskritaj aŭ el vortoj, prenitaj mikse el ĉiuj lingvoj de l' mondo. (La lingvo mem multe per tio ĉi 'perdis', fariĝinte tute nekomprenebla; sed kion ĝi 'gajnus', esceptinte la sennecesan instruitan esksteron? Tion ĉi ili tute forgesis sin demandi.) (D-ro L.L. Zamenhof)

## **Belgio sur vojkruciĝo**

*(Belgio op een kruispunt)*

Ĉar la plej multaj eksterlandanoj, kaj eĉ belgoj, ne komprenas, kio politike okazas en Belgio, mi volas analizi la situacion en Belgio tiel, kiel la plej multaj flandroj spertas ĝin.

Unue estas la lingvoproblemo.

Carel van Mander (1548-1606), pentristo kaj arthistoriisto, skribis en sia fama "Schilder-

Boeck” (1604), ke la rilatoj inter flandroj kaj valonoj estas amikecaj. Ili eĉ interŝanĝis siajn infanojn, por ke ili lernu la lingvon unuj de la aliaj. Tiuj lingvoj estis nur dialektoj. Sed ekde ĉ. 1750 la superaj sociaj tavoloj franciĝis kaj en Valonio kaj en Flandrio, tiel ke, kiam Belgio sendependiĝis en 1830, la tuta administracio kaj instruado, escepte en la bazaj lernejoj, okazis franclingve. Nur kampuloj kaj laboristoj parolis siajn dialektojn. Oni intencis francigi ankaŭ Flandrion. Al tiu provo la flandroj rezistis, kaj tiel komenciĝis longa lingvolukto, kiu ankoraŭ ne finiĝis.

De kiam la valonoj lingve franciĝis, ili ankaŭ transprenis la ŝovinismen de la francoj, laŭ kiuj la francaj lingvo kaj kulturo estas la kulmino de civiliziteco. Sufiĉas rigardi mapon el la 17-a jarcento por konstati kiom da flandralingvan teritorion en Nord-Francio kaj la nuna Belgio konkeris la franca lingvo. Iam Bruselo estis tute flandrilingva urbo. Nuntempe ĝi estas oficiale dulingva, sed la bruselanoj ne aplikas la lingvajn leĝojn, tiel avantaĝigante la francan lingvon. La plimulto de la valonoj, kiuj establis sin en Flandrio, ĉefe ĉirkaŭ Bruselo, rifuzas lerni la nederlandan, kiu estas la oficiala lingvo en Flandrio. Tio tamen estas la devo de ĉiuj enmigrintoj. Tiel la franclingvanoj minacas la lingvon kaj la teritorion de Flandrio.

Due estas la ekonomia problemo. Dum en Flandrio ĉiam regis ĉefe la dekstraj partioj, en Valonio jam de pluraj jardekoj regas la maldokstruloj – socialistoj –, kun la rezulto tute malsimila socia-ekonomia situacio. Precipe pro la fermo de la karbominejoj kaj la krizo de la ŝtalfabrikejoj, la socia-ekonomia situacio en Valonio forte plimalboniĝis, tiel ke ili bezonis financan subtenon de la flandroj. En tiu-ĉi momento la monfluo de Flandrio al Valonio sumas je 12 miliardoj (12.000.000.000) eŭroj jare. Tiu provizora subteno fariĝis kutimo kaj daŭras jam 50 jarojn. Valonio ne sufiĉe klopodis estintece plibonigi ĝian situacion, kaj la flandroj ne plu volas donaci tiom da mono al Valonio, kio minacas ilian prosperecon. Ankaŭ Bruselo estas finance subtenata de Flandrio. Tial Flandrio postulas pli justan reformon de la ŝtato, kiu donas pli da respondecon al la regionoj, kiuj devas memstare prizorgi sin mem. Sed la franclingvanoj ne volas ŝanĝi tiun situacion, kiu estas maljusta kaj netenebla por Flandrio, timante malriĉiĝon. Ĉu ili pridubas siajn proprajn kapablecojn ŝanĝi la misituacion en siaj regionoj, kvankam la flandroj promesis gardi la socian solidarecon inter la regionoj?

Estintece estis la flandroj, kiuj ĉiam cedis al la postuloj de la franclingvanoj. Nun la vico estas al la franclingvanoj cedi al la justaj postuloj de la flandroj.

*Pieter Jan Doumen*

### **Nikolao Tesla, neagnoskita genio** *(Nikolas Tesla, een miskend genie)*


Por multaj inter ni Tesla estas nekonata. Por iuj li donis sian nomon al la unueco de magnetindukto kaj inventis la trifazan alternkurenton. Li tamen estas la plej granda teĥnika genio de la periodo 1880-1930, kiu interalie malkovris neelĉerpeblan fonton de malmultekosta kaj pura energio, la etera energio, kiun li sukcesis transmissii sendrate. Malfeliĉe 30 jarojn antaŭ lia grava malkovro komenciĝis en Usono la ekspluatado de nafto...

Li naskiĝis la 10-an de julio 1856 en Smiljan, vilaĝeto en Kroatio. Lia patro estis serba ortodokso pastro, kiu mem instruis siajn infanojn. Kvinjara, Nikolao konstruas muelejon kun rado sen padeloj, kiu anoncis lian turbinon. Dek-sepjara, li povas vizii aparaton sen bezoni planon aŭ maketon. “Ĉio kion mi inventas, funkcias kiel mi imagis tion,” li mem diris. Tio estas la kaŭzo, kial restas tiel malmulte da planoj aŭ desegnaĵoj de liaj inventoj.

Post siaj studoj en Graz (Aŭstrio) kaj Prago, li eklaboras en 1881 en la centra oficejo de la telegrafoj en Budapeŝto, kie li inventas alternkurentan maŝinon kaj konceptas en nur du monatoj ĉiujn tipojn de la estontaj motoroj.

En 1883, kiel inĝeniero ĉe la *Continental Edison Company* (Kontinenta Kompanio Edison) en Parizo li konstruas sian unuan pratipon. Tial lia direktoro varme rekomendas lin al Edison. En 1884 li ŝipas al Usono. Por testi lin, Edison sendas lin ripari la dinamojn de personŝipo. En unu nokto li sukcesis ripari ilin. Post tio li riparas ankaŭ la malbone funkciantajn dinamojn de Edison, sed tiu-ĉi rifuzas pagi al li la promesitan premion de 50.000 dolaroj! Tesla demisias, sed li jam estas konata, kaj financa grupo proponas al li starigi kompanion por fabrike arklampojn, sed li estas baldaŭ maldungita.

En 1887 alia grupo helpas lin fondi la Elektran Kompanion Tesla por disvolvi la alternkurenton. En 1891 li jam disponas pri 40 brevetoj! Poste *Westinghouse*, la granda konkurenco de Edison, dungas lin kaj aĉetas liajn brevetojn. Post titana lukto kontraŭ la konkurento Edison la alterna kurento de 60 Hz venkas. La benkisto Morgan aĉetas *Westing-*



house Company kaj la brevetojn de Tesla, kiu dediĉas sin nun al la radio kaj la libera energio de la etero en la spaco. Tiu energio manifestiĝas per eroj, la tahionoj, kiujn definis Feinberg kaj Sudershan kaj kiuj veturigis tiun energion je rapidecoj pli altaj ol tiu de lumo. En la 60-aj kaj 70-aj jaroj de la 20-a jarcento pluraj usonaj, rusaj kaj okcident-eŭropaj sciencistoj studos la demandon. Laŭ ili la etero enhavas imensajn kvantojn da energio: 500 Kwh en unu  $\text{cm}^3$ ! Einstein tamen neis la ekziston de la etero!

En 1893 li priskribas la principojn de radioelsendado kaj donas en Saint-Louis [sejnt'luis] publikan demonstracion de radiokomunikado du jarojn antaŭ Marconi!

En 1894 Tesla publikigas sian teorion pri la lumo kaj la etero. Laŭ li 90% de la energio de la lampoj estas malŝparata, kaj estontece ne plu neceso transporti energion, eĉ sendratan, se oni utiligos la energion de la etero.

En 1895 Westinghouse ricevas kontrakton por konstrui alternkurentan centralon sur la akvofaloj de Niagaro. Ĝi estas la unua tiutipa centralo kaj portas la nomon Tesla. Ĝi havas 7 generatorojn kun la totala potenco de 50.000 da ĈV (ĉevalpovoj)!

En 1898 li brevetas la kondukadon de aŭtoj je distanco per radio kaj prezentas telekomandatan robotŝipon. Ĉar lia laboratorio en Nov-Jorko ne plu prezentas sufiĉajn garantiojn de sekureco por la bobenoj de 4.000.000 da voltoj, li konstruas esplorcentron en Colorado Springs je alteco de 1800 m, kiu okupiĝas pri la transmision de sendrata energio. La stacio similas al ŝipo kun masto de 37 m de alteco sur turo de 25 m. La masto portas kupran globon kun diametro de 90 m. Ĝia transmisiilo kaŭzas radiajn perturbojn. Ĝi produktas tensiojn atin-

gantajn 100.000.000 da voltoj, kiuj kaŭzas gigantajn tempestojn ĝis distanco de 25 km!

Laŭ la koncepto de Tesla, diskordanta kun la teorio de Hertz, la tero kaj la altaj atmosferaj tavoloj kondukas energion. Tial li volas konstrui mondan radioelsendan centron. Tamen li ne povas finkonstrui la centron, ĉar Morgan rifuzas doni al li novajn kreditojn. En 1912 Tesla devas hipoteki la stacion, kaj en 1917 la turo estas detruita de siaj proprietuloj.

En 1931 li sukcese eksperimentas per elektra veturilo, nutrata per libera energio. Ĝi atingis 145 km hore, sed oni ne retrovis la planojn.

La 7-an de januaro 1943 li mortas en Nov-Jorko pro koronaria trombozo, kunportante multajn sciencojn sekretojn. En la sama jaro la usona supera kortego rekonas, ke Marconi kopiis la brevetojn de Tesla.

Tesla opiniis, ke la teĥnologio disvolvita de Marconi estas neadaptita kaj malbone konceptita. Efektive, nur eta parto de la energio atingas la ricevilo, kiu devas forte amplifiki ĝin. Tesla kontestis la teorion de Hertz, kiu konsideris la radion kiel radiadon, tute kiel la lumo. Laŭ Tesla la radio estas kondukta fenomeno kaj ne radiado. Temas pri perturbo de la etero. La transmisiilo alterne kunpremas kaj dispremas la eteron, kiu estas elasta medio. La transmision efektiviĝas precipe tra la tero, pli ol tra la aero. Lia sistemo ebligus la transmision de elektra energio en grandegaj kvantoj tra grandegaj distancoj.

La intelekta kapablo de Tesla kaj lia persisto kondukis al revoluciaj inventoj, kies gravecon oni ankoraŭ nun ne ĝuste taksas. Dum lia fama konferenco de la 20-a de majo 1891 li asertis, ke la estontaj maŝinoj estos nutrataj per la energio disponebla en la spaco: "La homoj sukcesos konekti siajn maŝinojn al la grandaj radoj de la naturo."

La daŭraj nunaj energikrizoj minacas nian prosperon. Krom tio, la karbo- kaj mazutcentraloj poluas la atmosferon kaj tro varmigas la teron, la konstruo de hidraŭlaj centraloj, kiel en Ĉinio, grave damaĝas la medion, dum nukleaj katastrofoj avertas nin pri la granda danĝero kiun prezentas la atomcentraloj por la vivo mem. Ŝajnas do urĝe, ke oni ekekspluatu nun la neelĉerpeblan, malmultekostan kaj sekuran energifonton, kiu estas la etero. La ideoj de Tesla pri la libera energio, obskurigitaj de la liatempaj sciencistoj kaj financistoj, reprenas nun sian tutan gravecon post pli ol cent jaroj.

(La revuo Science et Foi)

## Denove pri neologismoj

(*Opnieuw over neologismen*)

Esperanto estas relative facile lernebla por ĉiuj kiel dua lingvo pro sia reguleco, logiko kaj senlima ebleco fari novajn vortojn. Ĝi certe estas facila kompare kun la naciaj lingvoj, kies neregulaĵojn kaj fiksjajn esprimojn alinaciano tre malofte povas mastri.

Sed multaj esperantistoj, precipe ekster Eŭropo, ĉagreniĝas pro la multaj neologismoj, kiuj invadas la lingvon, precipe en la sciencoj.

Claude Piron lernis Esperanton kiel infano. Ĉar li disponis nur pri la tre limigita vortaro de sia lernolibro, li plene aplikis tiun senliman eblecon de Esperanto en sia korespondado por fari novajn vortojn. Tiel li montris, ke eblas eviti la uzon de multaj neologismoj, kiuj do ne estas necesaj.

De kie venas vortaĉoj kiel *poeto, redaktoro, botaniko aŭ ateisto*? Ĉu ne miloble pli belaj kaj tuj kompreneblaj estas *poemisto, redaktisto, plantoscienco* kaj *sendiisto*? La *vivoscienco* (biologio) prenis ĉiujn siajn terminojn el la latina kaj la greka lingvoj por nomi la speciojn. Sed por multaj plantoj ankaŭ ekzistas vere Esperantaj (fundamentaj) nomoj. Tamen por ĉio alia mankas en la sciencoj logikaj, vere Esperantaj nomoj. Certe lingvo vivas kaj iras sian propran vojon. Oni ne povas halti tiun iron. Sciencistoj ĉiam daŭrigos uzi inter si grekajn kaj latinajn nomojn. Sed ili estas kelkfoje bedaŭrinde malfacilaj pro la vorta multeco, kiuj kaŝas fakte facilajn ideojn kaj nociojn. Tamen ili ekfaciliĝas, kiam oni serĉas la grekajn radikojn kaj tradukas ilin en fundamentan Esperanton. Esperanto povus esti tre bela kaj komprenebla lingvo por la sciencoj, kaj certe estos tia por la nesciencistoj, uzante la regulan vortfaradon. Esperanto senbezzone imitas la malfacilecon de la naciaj lingvoj en sciencaj fakoj pruntante vortojn el la latina kaj la greka. Tamen Esperanto ne estas la angla aŭ la greka kun o-finaĵoj. Esperanto povas fari ĉiujn tiujn vortojn per Esperantaj vorteroj! Tiel scienco iĝis facila por ĉiuj! Kaj ne nur por la eŭropanoj, kiel nun estas la kazo.

Eble pli klera ŝajnas iu, kiu kapablas diri: *Entomologio estas fako de zoologio pri la insektoj. Pedunklo estas tigo kiu subtenas floron. Kaliko estas aro da sepaloj. Ovario estas ujo kiu enhavas ovolojn. Ktp.*

Sed danke al la analizebleco de tiaj vortoj, multaj tiaj frazoj iĝas tute trivialaj. Tio vidigas la senutilecon de la novaj radikoj

En bona Esperanto oni povas diri anstataŭe:

*Insektoscienco estas fako de bestoscienco pri la insektoj. Flortigo estas tigo kiu subtenas floron. Sepalaro estas aro da sepaloj. Ovolujo estas ujo kiu enhavas ovolojn. Ktp.*

(*Laŭ la Interreto*)

## Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

**Belgio** – *Esperanto en la Eŭropa Komisiono* –

Ni ekuzis la traduksistemon lanĉitan kadre de la Eŭropa Komisiono ĉe <http://itranslate4eu> (tio angle prononciĝas kiel “I translate for EU” [mi tradukas por EU]).

La sistemo celas aŭtomatan tradukadon inter ĉiuj EU-aj lingvoj. Sed mirinda fakto estas, ke Esperanto estas inter la elekteblaj lingvoj, kvankam ĝi nenie estas menciita en la tekstoj.

Ni tuj registris kaj ekuzis ĝin. Unue ni tradukigis el Esperanto en niajn naciajn lingvojn la sekvantan frazon: “*En la mondon venis nova sento*”. Ĉi-kaze la rezulto estis sufiĉe bona, – se oni komparas ĝin al tiuj de aliaj tradukmaŝinoj. [Fakte tiu maŝino konsistas el “la aliaj tradukmaŝinoj”. La “sistemo” uzas ekzistantajn maŝinojn. La iniciatintoj esperas, ke la reagoj de uzantoj helpos plibonigi la tradukilojn.]

Verŝajne ankoraŭ temas pri la tiel nomata beta-versio. La sistemo estas/os senpage uzebla. Laŭ nia kompreno oni petas la uzantojn informi pri la kvalito de la tradukaĵoj liveritaj de la diversaj, apartaj kunlaborantaj tradukmaŝinoj. Ankaŭ eblas proponi propran tradukon. Ni jam plurfoje faris tion.

Ni kredas, ke gravas por Esperanto uzi tiun sistemon kaj laŭeble plej multe indiki sian preferon klakante sur la steleton apud la plej taŭga tradukaĵo.

Ni esperas, ke multaj esperantistoj kunlaboros proponante pli precizajn Esperantajn kaj nacilingvojn tekstojn. Tiele ni montru al la EU-aj instancoj, ke Esperanto estas uzata en la Unio. Samtempe ni tiele kuraĝigu kaj subtenu la homojn, kiuj programis la tradukadon el kaj al Esperanto.

(*Leo De Cooman, Belgio, kaj Ludoviko Molnár, Hungario*)

**Tajvano** – *Azia filmo kun Eo-subtekstoj* –

Antaŭ nelonge en Tajvano aperis la unua azia longa filmo kun Esperantaj subtekstoj. La filmo estas dokumenta kaj aperis sur la ekranoj de grandaj kinejoj dum semajnoj en la pasinta vintro. Ĝia reĝisoro, S-ino Hsueh Chang-hui, estas tre entuziasma pri Esperanto kaj esprimis la deziron lerni ĝin kaj iam fari filmon pri

Esperanto kaj ĝia historio en Tajvano. La filmo, nomata E.SHA Epoko, rakontas la historion de iama tre populara kant- kaj dancgrupo kun 52 membroj, ĉiuj virinoj (inspirita de konata grupo en Japanio), kiu vojaĝis eksterlanden por prezenti siajn muzikalojn. Poste, pro politikaj kaj ekonomiaj kialoj, la grupo devis ĉesi sian agadon, kaj nun post dekoj da jaroj ili revenas por serĉi sian iman gloron kaj instrui sian arton al junaj artistinoj. Tial la filmo enhavas amason da kantoj kaj dancoj kun multaj rakontoj pri ilia pasinteco, kaj la spektantoj samtempe lernas multe pri la historieto de Tajvano dum la lastaj jardekoj. Oni povas vidi parton de la filmo sur Youtube ĉe [http://www.youtube.com/watch?v=CqLed\\_pL\\_q8](http://www.youtube.com/watch?v=CqLed_pL_q8). Ĉi tie oni povas vidis la kovrilon de la *Formoza Folio*, gazeto de la Tajvana Esperanto-Movado. Ĝi estas dediĉita al tiu filmo: <http://kheikhah.tripod.com/ff13.html>.

La filmo estas mendebla per la Katalogo de la Libroservo de UEA, kaj ankaŭ ĉe la verkanto de tiu ĉi artikolo. Estas menciinde, ke krom subtekstoj en Esperanto kaj la ĉina oni povas ankaŭ elekti la japanan aŭ la anglan lingvojn. Tempodaŭro: 96 min. (Ret-Info, Eventoj)

#### **Irlando – Letero al ĉiuj eŭroparlamentanoj –**

Karaj geamikoj, tiun ĉi leteron mi skribas por informi vin, ke ni sukcese disdonis hodiaŭ, la 07.05.2011, en la Eŭropa Parlamento la lastan leteron de EEU al ĉiuj eŭropaj parlamentanoj en 22 el la 23 oficialaj lingvoj (mankis nur la malta).

Mi ŝatus danki al Maja Tišljarić kaj Jozef Reinwart, kiuj disdonis la leteron kun mi, sed mi aparte dankas al Maja pro ŝia grandega laboro: ŝi mendis, preparis kaj ordigis la tradukojn, aldonis la tekston de la letero ĉiam en Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la alparolato. Ŝi eĉ faris apartajn leterojn por la nederlandanoj kaj flandroj, la franclingvaj belgoj, francoj kaj luksemburgianoj, la svedlingvaj finnoj, la anglalingvaj irlandanoj kaj irlandlingvaj irlandanoj, ktp. Sufiĉe komplika laboro, ĉar temas pri 751 eŭroparlamentanoj el 27 landoj, uzante 23 oficialajn lingvojn.

Mi dankas ankaŭ al ĉiuj efikaj tradukantoj, kiuj ebligas al EEU fari sian laboron tiom multlingve – estas vera pruvo de la subteno de esperantistoj al multlingveco. Kaj mi petas pardonon de la tradukantoj pro la malmulto da tempo disponebla: ankoraŭ venadis etaj ŝanĝoj de kelkaj el la 29 tuteŭropaj organizaĵoj de la Platformo al la ‘fina raporto’ ĝis la tria



semajno de aprilo, kaj ni volis disdoni la leteron antaŭ la Eŭropa Tago, la 9-an de majo. Amike, Seán Ó Riain, prezidanto de EEU. (Ret-Info, Eventoj, Hungario)

#### **Usono – Esperantlingva dokumenta filmo –**

La dokumenta filmo de Sam Green pri Esperanto, *The Universal Language (La universala lingvo)*, estis prezentita dum la ĉi-jara kongreso de Esperanto-USA, kiu okazis en Emeryville, Kalifornio de la 17-a ĝis la 20-a de junio.

La 25-minuta dokumenta filmo pri Esperanto estas ĉefe la produkto de la filmado de kelkaj pasintaj Universalaj Kongresoj de Esperanto fare de Sam Green. La malneto de la filmo estis prezentita en decembro 2010 dum la Esperanto-simpozio ĉe UN en Novjorko, organizita de la novjorka oficejo de UEA kaj vizitata de George Soros. Tiu ĉi estas la dua el la du planitaj filmoj. La unua, *Utopia in Four Movements (Utopio en kvar movimentoj)*, estis unue prezentita dum la filmfestivalo Sundance kaj estis bone akceptita.

La kunlaboro inter ESF kaj reĝisoro Sam Green datiĝas de 2006, kiam ESF konsentis provizi limigitan financan subtenon por la dokumentan filmon de Sam Green, kies unua filmo, *The Weather Underground (La vetera subtero)*, estis nomumita por la *Academy Award* (Akademia Premio). La dua subvencio estis donita al li en 2007. S-ro Green kaj lia teamo vizitis en 2006 la Universalan Kongreson en Florenco, kaj en 2007 tiun de Jokohamo. Por sciiĝi pli pri Sam Green konsultu: <http://www.samgreen.to>.

Ankaŭ ESF estis larĝe prezentita dum la kongreso, kun kvin el ok estraranoj. La prezidanto de ESF, Humphrey Tonkin, faris

festparoladon kun la temo “La nova rolo de Esperanto”, kaj ESF faris la prezentaĵon “Konatiĝu kun *Esperantic Studies Foundation*”. (Ret-Info, Eventoj, Hungario)

#### **Danio – Danca irado tra Kopenhago –**

Dum la ĉi-jara U. K. en Kopenhago, multaj kongresanoj partoprenis en speciala evento en tiu urbo, nome al la “farandolo”, kies proponanto kaj gvidanto estis Mireille Grosjean. Temis pri surstrata gaja procesio, danca irado de japana deveno, dum kiu ĉiu partoprenanto surhavis blankan rubandon ĉirkaŭ la kapo. La surhavo de tia rubando, kiun oni nodas malantaŭ la kapo, signifas por la japanoj: “Mi atingos mian celon”. Sur la rubando ĉiu partoprenanto skribis en la dana la nomon de sia lingvo. La danca irado okazis dimanĉe kaj komenciĝis je la 17h00 ĉe la kongresjo. Ĝi finiĝis en Tivoli, la loko de la nacia vespero, trairinte la ĉefan urbostraton.

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

#### **Nia vasta, bunta mondo**

*Onze wijde, bonte wereld*

##### **1. « Pukkelpop » funebras**

*(Pukkelpop in diepe rouw)*



Kio devus esti muzikfestivalo por la junuloj en Hasselt (Belgio), fariĝis terura katastrofo. Neniam antaŭe spertita fortega vento kun uragana forto, akompanata de torentaj pluvegoj kaj hajloŝtonoj, dikaj kiel tablotenisaj pilketoj, ŝanĝis la festivalteron en dek minutojn en apokaliptan pajzaĝon jaŭdon, la 18-an de

aŭgusto. Tendoj kaj podioj estis detruitaj, kaj grandaj arboj rompiĝis kiel alumetoj. Tra tiu nepriskribebla ĥaoso junuloj serĉis siajn amikojn. Helposervoj, kunlaborantoj kaj sekurecanoj helpis kie ili povis. La herbejo ŝanĝiĝis en ŝlimmarĉon. Ĉiuj estis malsekaj kaj malpuraj. Entute 4 personoj estis mortigitaj surloke, kaj ĉirkaŭ 40 aliaj estis vunditaj, inter kiuj 11 grave. Kelkajn tagojn poste mortis la 5-a festivalano. 3 minutojn post la katastrofo ĉiuj sav-elirejoj jam estis malfermitaj, kaj ĉiuj povis forlasi la terenon. La konfuziĝo estis kompleta, sed nenie regis paniko. La loĝantoj de la najbaraj stratoj spontane helpis la viktimojn dum kaj post la katastrofo. Ili malfermis al ili siajn domojn, distribuis manĝaĵojn, trinkaĵojn kaj varmajn vestaĵojn kaj disponigis al ili sian telefonon kaj banĉambron. En la domo de 87-jara maljunulino rifuĝis pli ol 40 junuloj, kiuj troviĝis ŝirmon en preskaŭ ĉiuj ĉambroj de ŝia domo. (De Weekkrant)

#### **2. Misteraj terskuoj en Majno**

*(Mysterieuze aardschokken in Main)*

Dum la unua semajno de majo serio da misteraj terskuoj trafis la usonan ŝtaton Majno. En regiono, kie normale neniam okazas tertremoj, la loĝantoj sentis dekojn da terskuoj, kiuj mal multe similis al normalaj tertremoj kaj ofte estis raportataj kiel eksplodo aŭ krako. En tiu ŝtato normale okazas nur unu aŭ du tertremoj. Geologoj opinias, ke okazis nenio grava. Laŭ artikolo en la gazeto Bangor Daily News multaj loĝantoj en la areo ĉirkaŭ la urbetoj Belfast kaj Bucksport [“bakspot”] komunikis al la lokaj aŭtoritatoj, ke ili aŭdis sonojn, kiuj similis al pafoj. Krom tio oni menciis, ke domoj skuiĝis sur siaj fundamentoj kaj ke pentraĵoj falis de la muroj. La okazaĵoj estas tiel fremdaj, ke multaj loĝantoj kredas, ke temas pri eksplodoj kaj ne pri tertremoj, kio pruvas, ke koncernas neordinarajn terskuojn.

“Ni daŭre ekzamenas la fenomenon,” diris la korpusestro de Serasport, Dick LaHaye, kiu ricevis multajn pertelefonajn menciojn dum la lastaj tagoj. “Estas klare, ke okazas io. La polico ne komprenas, pri kio temas, sed ni senĉese respondadas al la homoj.”

Henry Berry, geologo de la geologia servo de Majno diris dum pertelefona intervjuo, ke la tertremoj estas negravaj kaj preskaŭ ne senteblas. Sed se konsideri la menciojn kaj spertojn de la loĝantoj, kiuj sentis la skuojn, tiaj eldiroj estas malfacile kompreneblaj.

(Naturalnews.com, Interreto)

*Met de hartelijke groeten van  
Kun la koraj salutoj de*

**KBC-Bank Hechtel**

Rode Kruisplein 5  
B-3940 Hechtel  
Tel. 011-73.02.20  
Fax 011-73.02.21  
[hechtel@kbc.be](mailto:hechtel@kbc.be)

**Nia rakonto: La domo de Eŭlalia**

*(Ons verhaal : Het huis van Eulalie)*

Ĝi estis beleta, malgranda domo en tre ĉarma regiono, en malmulte vizitata angulo de Normandio apud la maro : regiono kun fruktarbaroj, kolzokampoj, verdaj herbejoj, kie pastiĝis brutaro, kaj kun longaj ulm-ombrataj aleoj.

Oni estis iomete surprizita vidi tie ĉi-tiun malgrandan domon, ĉar ĉiuj domoj en tiu ĉi ĉirkaŭaĵo estis maldelikataj kampuldomoj aŭ kabanoj de laboristoj ; sed tiu ĉi dometo estis koketa, malgranda ĉaleto kun blankaj muroj, mallarĝaj francaj fenestroj, balkonoj el tordita feraĵo kaj veneciaj fenestroviriloj : gaja, eta plezuriga domo, staranta en belega ĝardeneto inter rozujoj, geranibedoj kaj ebenaj gazonoj. Trans la ĝardeno troviĝis fruktarbaro – viĉoj kaj paroj da tuberozaj maljunaj pomuloj, kliniĝintaj unuj al la aliaj kiel fantaziaj figuroj, haltigitaj meze en danco. Tiam turniĝinte, oni rigardis super mejlon da ondiĝantaj kolzokampoj kaj flavaj grenkampoj ĝis la maro kaj la serpentuma perspektivo de blankaj klifoj, kiujn la maro banadis en diafanaj verdoj kaj violoj, lumaj ombroj de ĝiaj sennomaj kolornuancoj.

Tabulo fiksita sur la muro konfirmis en maldelikate pentritaj literoj la informon kiun mi ricevis de agento en Dieppe. La domo estis luebla, kaj mi estis veturinta du horojn por rigardi ĝin. Nun mi staris sur la sojlo kaj sonorigis. Estis granda sonorilo, kiu pendis en la vestiblo, kun pendanta bronza tenilo, farita en la formo de ŝnuro kun kvasto. Ĝia sono resonis malproksime tra tiu silenta kampara aero.

Kiel ajn, ĝi resonis ĝis malalta, pajlokovrita kampuldomo je ĉirkaŭ cent metroj laŭlonge de la vojo. Baldaŭ viro kaj virino eliris la kampuldomon, rigardis momenton en mia direkto kaj

tiam venis al mi; maljuna bruna viro en ripvelura pantalono kaj maljuna griza virino en blanka katuna kufo kaj blua antaŭtuko, ambaŭ moviĝantaj kun la peza irmaniero de kampuloj.

«Ĉu vi estas la gesinjoroj Leroux ? » mi demandis, post kiam ni salutis nin, kaj mi eksplikis, ke mi venis de la agento de Dieppe por rigardi la domon. Cetere ili verŝajne estis atendantaj min ; la agento estis dirinta al mi, ke li avertos ilin.

Sed je mia miro tiu ĉi aferisma anonco ŝajnis iel konfuzi ilin; mi pensis, ke ĝi eĉ agitis aŭ maltrankviligis ilin. Ili levis siajn maljunajn, eluzitajn vizaĝojn, time okulumis al mi kaj interŝanĝis zorgoplenajn rigardojn. La virino kunfaldis la manojn, nerveze movante la fingrojn. La viro hezitis kaj balbutis momenton, antaŭ ol li povus malcerte ripeti : « Do vi venis rigardi la domon, sinjoro ? »

« Certe, » mi diris. « Ĉu la agento skribis al vi ? Mi komprenis, ke vi estos atendantaj min hodiaŭ je tiu ĉi horo. »

« Ho jes, » koncedis la viro, « ni estis atendantaj vin. » Sed li faris nenion por progresigi la aferon. Li interŝanĝis plian timeman rigardon kun sia edzino. Ŝi kapjesis senhelpe kaj rigardis la teron.

« Vi vidas, sinjoro, » li diris finfine, kvazaŭ li intencus klarigi la situacion ? « vi vidas... » Sed post tio li hezitis, rigardis la ĉielon, kuntirante la brovojn, kiel iu kiu serĉis la ĝustajn vortojn.

« Eble la domo jam estas ludonita ? » mi sugestis.

« Ne, la domo ankoraŭ ne estas ludonita, » li respondis.

« Estus pli bone, ke vi iru preni la ŝlosilon, » fine sombre diris lia edzino, ankoraŭ ĉiam rigardante la teron.

Li peze promenis ree al la kampuldomo. Dum li forestis, ni staris ĉe la enirpordo, la virino ankoraŭ ĉiam nerveze tordante siajn manojn. Mi mem provis komenci konversacieton : mi laŭdis iomete la bonegan lokon, la belecon de la panoramo. Ŝi konsentis, ĝentile kaj lace murmurante, tiel ke mi ne sentis min kuraĝigita daŭrigi.

Iom poste ŝia edzo denove aliĝis al ni kun la ŝlosilo, kaj silentante ili komencis konduki min tra la domo.

En la teretaĝo estis du belaj salonoj, bela manĝejo, moderna kuirejo kun larĝa fajrejo el poluritaj ruĝaj brikoj, kahelita kameno kaj brilaj kupraj kasaroloj kaj potoj. La salonoj kaj la manĝejo estis agrable tapetitaj en leĝera



franca maniero, kaj iliaj fenestroj malfermiĝis al la suno kaj la aromoj kaj verdaĵoj de la ĝardeno. Mi ofte esprimis mian admiron, tiel ke iom post iom la sinteno de miaj gekondukantoj ŝanĝiĝis. De rigida kaj deprimita, ĝi fariĝis afabla kaj elkora, ĉe la fino eĉ entuziasma. Ili respondis al miaj ekkrioj per ridetoj kaj al miaj demandoj per vastaj abundaj respondoj. Sed ilia konduto restis agitita, la konduto de homoj kiujn skuis granda emocio. Iliaj maljunaj manoj tremetis, kiam ili malfermis ian pordon por mi aŭ suprentiris la fenestro-kovrilojn ; iliaj voĉoj tremetis. Estis io doloriga en iliaj ridetoj, kvazaŭ tiuj ĉi estis momentaj sulketoj sur la surfaco de ilia konfuzeco.

« Ha, » mi diris al mi mem, « ili certe urĝe bezonas monon. Verŝajne ili elspezis sian tutan kapitalon por tiu ĉi domo. Ili estas ekscititaj ĉe la prospekto ricevi luanton. »

« Nun, se plaĉas al vi, sinjoro, ni supreniros al la etaĝo por rigardi tie la dormoĉambrojn, » diris la maljunulo.

La dormoĉambroj estis spacaj, belaj ĉambroj, gaje tapetitaj kun ĉincaj<sup>8</sup> kurtenoj kaj la kutima franca dormoĉambra meblaro. Unu el ili montris spurojn de reala uzo en la pasinteco; estis aferoj en ĝi, personaj aferoj, virinaj aferoj. Estis la lasta ĉambro kiun ni vizitis, antaŭflanka ĉambro, rigardanta la maron. Kombiloj kaj brosoj kuŝis sur tualettablo. Plumoj, inkujo kaj paperujo kuŝis sur skribtablo. Estis libroj sur bretaro. Enkadrigitaj fotoj staris sur la kamenbreto. En murŝranko pendis roboj, kaj ŝuoj kaj pantofloj orde staris sur la planko. La lito estis kovrita per superlitkovrilo el blua silko. Krucifikso pendis sur la muro super ĝi ; apud ĝi staris preĝseĝo kun malgranda porcelana benitakvujo.

« Ho, » mi ekkriis, turnante min al la gesinjoroj Leroux, « tiu ĉi ĉambro estas okupita ! »

Sinjorino Leroux ŝajnis ne aŭdi min. Ŝiaj okuloj estis fiksitaj en apatia rigardo antaŭ ŝi, ŝiaj lipoj estis leĝere malfermitaj. Sinjoro Leroux levis la manojn al la plafono per stranga gesto kaj diris : « Ne, tiu ĉi ĉambro ne estas okupita en tiu ĉi momento. »

Ni malsupreniris kaj interkonsentiĝis, ke mi prenus la domon por la somero. Sinjorino Leroux estis kuiranta por mi, kaj sinjoro Leroux estis veturanta al Dieppe la venontan merkredon por venigi min kaj mia pakaĵo.

(*Daŭrigota*)

<sup>8</sup> Faritaj el katuno presita per desegnaĵoj (en la angla: chintz).

## **Limburga Esperanto-Asocio: Jarprogramo 2011-2012**

*Ĉiun lastan ĵaŭdon de la monato (escepte en decembro kaj januaro) okazos kunveno por la membroj kaj simpatiantoj de LEA, kiujn mi ĉe tiu ĉi okazo tutkore invitas. Eĉ se vi ankoraŭ neniam venis, ne hezitu fari la unuan paŝon!*

Ĵaŭdon, la 29.09.2011, ĉiu ĉeestanto rakontos pri siaj ferioj aŭ pri tio kion li faris dum ili.

Ĵaŭdon, la 27.10.2011, An Olijslagers gvidos skrablokudon

Ĵaŭdon, la 24.11.2011, Jan Doumen prelegos pri la usona interna milito (1861-1865).

Ĵaŭdon, la 15.12.2011: Zamenhoffesto en la restoracio "De Boskar", Markt 1, Peer, organita de Rik Leijskens.

Ĵaŭdon, la 12.01.2012: Vizito de Miĥaelo Bronstejn, konata esperantisto kaj talentriĉa rusa poeto, aŭtoro kaj kantisto.

Ĵaŭdon, la 23.02.2012: Bert Boon el Tienen prelegos. Temo ankoraŭ anoncenda.

Ĵaŭdon, la 29.03.2012: Henri Schutters gvidos tre interesan vortludon.

Ĵaŭdon, la 26.04.2012: Kantovespero. Paul Hotterbeekx akompanos la kantadon per sia gitaro kaj ankaŭ sola kantas en Esperanto.

Ĵaŭdon, la 31.05.2012: Kartludo (ĵokero).

Ĵaŭdon, la 28.06.2012: Paul Hotterbeekx organizos promenadon kun gvidisto ĉirkaŭ la fama Tomp (antikva turo) en Achel.

*La elementa kurso de Esperanto rekomenciĝos ĵaŭdon, la 1-an de septembro. Se vi iam sekvis tian kurson kaj deziras refreŝigi vian konon de Esperanto, vi povos sekvi ĝin SENPAGE. Ĝi okazas ĉiun ĵaŭdon escepte de ĉiu kvara ĵaŭdo.  
Loko: Kulturcentro "het Poorthuis", Peer.  
Komenco je la 8-a vespere.  
Profitu de tiu ĉi bona okazo!*

